

CxEA-retkomunikoj 1/2004

Enhavo:

1. Kongresoj de UEA kaj SAT alproksimigxas
2. Gxustigo de la informo pri Esperanto-ekspozicio en auxgusto
3. La diskutlisto "cxehxaj esperantistoj" sen cxehxoj
4. Novaj libroj en la CxEA-biblioteko@
5. Alvoko al la organizantoj de E-arangxoj

1. Kongresoj de UEA (UK) kaj SAT alproksimigxas

Kiel jam tradicie, la UK-karavano de Prago estos internacia dekomence: jam aligxis 4 cxehxoj kaj 3 germanoj, intersoj montris pliaj kelkaj personoj el Cxehxio, Slovakio, Germanio kaj Aauxstrio. Gxi startos lunde la 19-an kaj la partoprenantoj kun la gxuo de la kongreso ekkonos du historie plej gravajn urbojn, Pekinon kaj Xi'an kun la cxirkauxajxoj. Ne ankoraux estas difinita prezo de la flugbileto kaj taksoj, tamen jam eblas promesi, ke la prezo ne transigos 60 000 Kcs (malpli ol EUR 2000). ATENTU: kvankam la plej favora periodo por aligxi al UK jam pasis, ni havas promeson, ke estos akceptitaj aligxiloj de niaj karavanoj por la samaj kondicxoj gxis la fino de februaro. Krome, necesas fiksi la nombron de bezobnataj flugbiletoj, tial interesatoj ne hezitu kaj skribu pri pli proksimaj informoj kaj aligxilojn vi povas ricevi cxe chrldle@kava-pech.cz

La SAT-kongreson, kiu okazos 2004-08-14/21 en Bratislava kun turisma postkongreso en Prago kaj Bohemia Karsto organizos cxehxa kongresa agentejo KAVA-PECH kunlabore kun slovaka Esperanto-Societo ESO. Jam aligxis pli ol 50 partoprenantoj el 14 landoj de 3 kontinentoj. La kongreso mem okazos en luksa kongresejo de City Hotel Bratislava, tamen ekzistas ankaxu tre favorprezaj logxebloj en agrabla studenta hejmo Lafranconi apud la rivero Danubo. Pli precizajn informojn kaj aligxilon vi trovos sur www.esperanto.cz, kun viaj demandoj vi povas turnigxi al chrldle@kava-pech.cz.

2. Gxustigo de la informo pri Esperanto-ekspozicio en auxgusto

Kiel estis anoncite en pasintaj retkomunikoj, 2004-08-07 estos inauxguro de la ekspozicio "Esperanto - mezinárodní jazyk přátelství a spolupráce" (= Esperanto - internacia lingvo de amikeco kaj kunlaboro), kio gxutas, sed gxi NE okazos Regiona muzeo en Břeclav, sed EN NACIA AGRIKULTURA MUZEO EN VALTICE. Pli da informoj vi povas ricevi cxe "Jaroslav_Pokorny" <nzm@cmail.cz>

3. La diskutlisto "cxehxaj esperantistoj" sen cxehxoj

Ekzistas jam kelkaj jaroj diskutforumo <http://groups.yahoo.com/group/cxehxaj-esperantistoj> kiu ne tro viglas. GxiA specialajxo estas, ke en gxi membras nur unu cxehxo, cxuij ceteraj estas eksterlandanoj. Laux la peto de gxia

provizora mastrumanto Don Harlow mi anoncas gxian ekziston en la retkomunikoj kun la rekomendo uzadi gxin kaj kun la alvoko, ke aligxu iu cxehxa esperantisto, kiu pretus gxin administri. Ja estas strange, ke la listo de cxehxaj esperantistoj estu mastrumata de Usono, cxu ne? Se vere la cxehxaj esperantistoj ne montras intereson, la listo estos post iom da tempo "mortigita".

4. Novaj libroj en la CxEA-biblioteko

La biblioteko de CxEA enhavas multajn novajn librojn. La plej grandaj donacintoj estis Detlev kaj Werra Blanke el Germanio, Petro Chrdle kaj UEA de la fondajxo Thorsen, krome pluaj donacis po unu aux kelkaj ekzempleroj. Koran dankon al ili. La nova kompletigita listo estas je dispono cxe "Zdenek_Pluhar" <m.pluharova@worldonline.cz>, sed tre baldaux gxi estos konsultebla sur TTT-pagxoj de CxEA kaj cxe www.esperanto.cz.

5. Alvoko al la organizantoj de E-arangxoj

Ni petas cxiujn organizantojn de arangxoj en Cxehxio (aux proksimaj regionoj de najbaraj landoj) sendi koncizajn informojn konsistantaj de dato, nomo de la arangxo, loko kaj kontaktadreso (prefere reta) al chrdle@kava-pech.cz, ke ili povu esti envicigitaj en venontajn retkomunikojn, kiujn ni supozas dissendi iam fine de februaro.